



HOMOJ NI ESTAS  
KAJ NENIO ROMA  
ESTAS AL NI FREMO  
NOVA SENTO

TRA LA MONDO  
EN LA MONDO  
IRAS FORTA  
PER FLUGILOJ DE FACILA VENTO

# Kulturaj Kajeroj

É MAHÉ →

DUMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO

Direktoro : P. BABIN, prezidanto de la Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj, 44 - NANTES, Francujo

JARABONO :

Simpla : 10 fkoj } P. BABIN  
Bonfara : 15 fkoj } 13, boulevard de la Chauviniere  
44 - Nantes  
P.Ĉ.K Nantes : 2.813.61

(Vidu la liston de niaj perantoj sur paĝo 4)

JANUARO - FEBRUARO

1971

1

# KULTURAJ KAJEROJ

1971

JANUARO - FEBRUARO

Dumonata informada kaj kultura revuo

## REDAKCIA KOMITATO :

### Sekretario :

P. Babin, 13, boulevard de la Chauvinière  
44 - Nantes

### Komitatanoj :

Paul Guillot  
Frédéric Thébaud  
Pierre Chevalier

La represo de artikolo el nia revuo estas permesita post interkonsento, kun la redakcio. Oni bonvolu ĉiam citi la nomon « Kulturaj Kajeroj » kaj sendi ekzempleron de la revuo aŭ gazeto en kiu aperis la koncerna represaĵo.

## ENHAVO

### El Grésillon

**Esperanto tra la mondo** A. Frangeul

**Sovaĝa orkideo** trad. E. Chérie

**Vivo kampara laŭ ritmo pasinta** P. Métivier

**En san Agustin : vivantaj enigmoj de la prahistorio**

**Anticipo : La spaca rado de la Ufi-anoj**

**Por via distro**

**Nia konkurso** P. Chevalier

## KULTURAJ KAJEROJ

ne similas, ne similos al aliaj Revuoj.

## KULTURAJ KAJEROJ

spegulos la vivon de nia Esperantista Kulturdomo.

## KULTURAJ KAJEROJ

publikigos la plej gravajn prelegojn aŭditajn de niaj vizitintoj, kaj artikolojn de diverslandaj eminentaj esperantistoj.

## KULTURAJ KAJEROJ

respondos al gramatikaj demandoj.

## KULTURAJ KAJEROJ

prezentos konkursojn, kaj diversajn amuzojn.

Ni deziras ke « **Kulturaj Kajeroj** » plaĉu al vi. Sendu viajn sugesojn, kaj kritikojn

# El Grésillon

---

---

Ĉu vi petis la programon? Ĉu vi rezervis ĉambron por unu el la paskaj aŭ someraj periodoj? Ne tro atendu. Ni jam ricevis iom grandan nombron da aliĝoj.

Ŝajnas, ke la gejunuloj pli multnombre ol la lastajn jarojn ĉeestos la 10an kulturalan semajnon organizitan de U.F.E. de la 4a ĝis la 9a de Aprilo. La programo de tiu semajno estas alloga kaj la ĉeesto de Profesoro Janton, kiu sukcesis enkonduki Esperanton en la studprogramon de gestudentoj en sia Fakultato ankaŭ pli riĉigos tiun periodon. La kursoj proponitaj por la dua semajno (9-16 de Aprilo) utile kompletigos la instruon de la unua. Speciala tarifo estas proponita al la gesamideanoj kiuj restados dum la du semajnoj.

Same interesaj estos la someraj periodoj. La tri diversnivelaj kursoj kaj la distraĵoj anoncigitaj por la unua periodo jam interesas kelkajn francojn kaj plurajn eksterlandanojn. La dua periodo proponas tre interesajn prelegojn el kiuj serion pri « Naskiĝo de l'Arto » fare de S-ro Rollinger, prelegojn ilustritajn per lumbildoj.

La Post Kongreso de S.A.T. jam ricevis intereson de S.A.T. membroj sed ni devas atentigi la eventualajn interesatojn, ke tiu periodo estas malfermita ankaŭ al ne membroj de S.A.T. Fine la kvara periodo prezentos programon similan je la unua kaj verŝajne ricevos la saman sukceson kiel la antaŭajn jarojn.

Vi nun elektu! Sed rapide petu informojn kaj rezervu vian ĉambron.

## POSTKONGRESO S. A.T. EN GRESILLON

La 44a S.A.T. Kongreso okazos en Orsay (Gise), apud Parizo, en la sciencofakultato, de la 31a de Julio ĝis la 6a de Aŭgusto. Postkongreso sekvos de la 7a ĝis la 14a de Aŭgusto en Grésillon.

Skribu al : S.A.T. 67, avenue Gambetta, Paris XX<sup>e</sup> (Francio).

# Esperanto tra la Mondo



## LA UNIVERSALA KONGRESO EN LONDONO

— La urbestro Sir Peter Studd estas la Alta Protektanto de la Kongreso.

— Libron pri la sciindaĵoj de Londono oni tradukis en Esperanton speciale por la Universala Kongreso. « Jen Londono » estas la titolo, kaj ĝi aperos en bone konata serio « Ladybird ». La libro estos havebla por la kongresanoj.

— Diversaj postkongresaj aranĝoj : en Dublino, la ĉefurbo de Irlando, oni preparas unusemajnan Postkongreson. Sestaga ferioestado okazos en Barlaston vilaĝo en nordokcidenta Anglujo. La feriantoj vizitos esperantan trinkejon, la mondfaman teleskopon de Jodrell Bank kaj la nordan marbordon de Kimrujo. Alia ebleco estos autobusa ekskurso al Devon. Vojaĝemuloj vizitos belajn lagojn kaj montojn de Norda Anglujo kaj Skotlando. Restado en Edinburgo ebligas admiri la historian universitan urbon.

— Londono vokas per sonbendo : la Loka Kongresa Komitato preparis distran sonbendon pri Londono. Grupestroj kaj individuoj povas peti teknikajn detalojn kaj kondiĉojn de S-ro P. Schilperoord, p/a LKK 56-a UK, 140 Holland Park Av, London W 11 4UF.

— La 27-a Internacia Junulara Kongreso okazos en Edinburgo tuj post la Kongreso en Londono.

— En Francujo U.F.E. preparas karavanon.

## LA FRANCA KONGRESO DE ESPERANTO

Ĝi okazos en Lyon dum Pasko (vendredon 9 ĝis Mardo 13 Aprilo). Oni antaŭvidas fak-kunsidojn diversajn, varietean vesperon, interesajn ekskursojn, junularan renkontiĝon, ktp... Adreso : Fino E. Gallon, 200, rue Boileau, 69 - Lyon 3<sup>e</sup>.

## SOMERA UNIVERSITATO PRI BALATONO

De la 15-a ĝis la 29-a de julio 1971 okazos en Veszprém (Hungarujo) Somera Universitato pri la lago Balaton. 14 prelegoj kun traduko en Esperanto pluraj ekskursoj, i.a. al Budapeŝto, kompletigos la programon. Informoj ĉe : Eva Chatel, Csikasz u. III. 3, Veszprém.

## SEMINARIO « LINGVO KAJ KULTURO »

Ĝi okazos de la 5-a ĝis la 12-a de septembro 1971 en Strasbourg (Francujo). Ĝin povas partopreni reprezentantoj de junularaj asocioj esperantistaj kaj ne-esperantistaj kaj ĉiuj interesiĝantaj individuoj. Laborlingvoj de la seminario estos Esperanto, angla kaj franca.

Ĉiujn informojn donas : NEJO-komisiono de TEJO, Kastelenstraat 231, Amsterdam-Z, Nederlando.

## LA FERVOJISTOJ KONGRESOS...

...en Maribor (Jugoslavio) ; de la 15-a ĝis la 21-a de majo. En 1972, ili renkontiĝos en Prago.

## INTERNACIA RENKONTO EN LEIPZIG

Dum printempa foiro, la 20-an de marto, 19 h., en Klub der Intelligenz (« Gottfried Wilhelm Leibnitz », Elsterstr. 35).

Informo ĉe : Germana Kulturligo-Esperanto D.D.R. 701 Leipzig, Käthe Kollwitz-Str. 115.

## UNIVERSITATAJ KURSOJ

La unua Universitata Kurso, kiu aplikos Esperanton kiel solan lingvon en universitata instruado, okazos de la 30-a de julio ĝis la 27-a de aŭgusto 1972 en la Universitato de Lieĝo (Belgujo).

Informo ĉe : Wim Jansen, Röntgenstr. 32a, Vlaardingen 3170, Nederlando.

## NOVA FILMO EN ESPERANTO

Norvega ŝtata Fervojo pretigis esperantan version de sia turistfilmo pri vojaĝo en suda Norvegujo. Titolo : « Mi estis tie ». 16 mm. Kolorfilmo. Daŭro : 20 minutoj.

Sin turni al Norvega Esperantista Ligo ; Boks 942, Oslo 1, sendante 2 intern. respondkuponojn.

## FIAT KAJ ESPERANTO

Ĝis nun la firmo Fiat eldonis kvin filmojn en esperanto (8 kaj 16 mm) kaj multajn presaĵojn.

Skribu al : Fiat — Direkcio, Stampa e Pubblicità, Corso Marconi 10, I-10125, Torino, ITALUJO.

## EN HUNGARA UNIVERSITATO...

Esperanto-trijara kurso kun diplomo okazas en filozofia-filologia fakultato de Universitato « Eötvös Lorand », en Budapeŝto.

## ...KAJ EN DANA

Post kampanjo en studenta gazeto kaj per afiŝoj, malfermiĝis kurso en la universitato de Kopenhago. Gvidas ĝin S-ro E. Svane.

## NORDA PRISMO

Nia sola literatura gazeto estas nepre subteninda ! En la 60 paĝoj de la lasta numero de la revuo enestas 27 diversaj titoloj, originalaĵoj kaj tradukaĵoj el deko da literaturoj.

## ESPERANTO-PAROLANTA JUNULARO

Novaj pri junularaj aktivecoj kaj precipe pri la laboro de T.E.J.O. (Tutmonda Esperantista Junulara Organizo) aperas en Esperanto, La Praktiko, Heroldo de Esperanto. Ankaŭ Pola Radio nun havas specialan programon pri la Esperanto-junularo.

Per aliĝo al T.E.J.O. kiel Patrona Membro, vi multe helpas la laboron de la Esperanto-junularo. Patronaj Membroj ricevas la revuon de T.E.J.O., « Kontakto », kune kun « Novajoj-Nouvelles-News ». Petu pri Patrona Membrecio (precipe por plenaĝuloj) kaj individua membrecio ĉe : T.E.J.O., Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam 2, Nederlando.

# SOVAĜA

# ORKIDEO

Orkideo ne ĉiam estas planto kun mirindaj floroj ; ĝi povas esti tre malgranda tigo, kies floro ne estas pli granda ol tiu de miozoto ; ĝi estas unukotiledona vegetalo.

La « epipactis » vegetas en niaj regionoj, en la profundo de ŝtonhavaj arbaretoj, de dunoj, de herbobedoj kaj de fagejoj.

La « platanthera bifolia » kun envultiganta parfumo kaj noktaj floroj kreskas en Eŭropo kaj Azio.

La « apostasiaceae » en Azio kaj Aŭstralio svarme multiĝantaj aspektas kiel genciano kun malgrandaj floroj.

La « Cypripediaceae » en Eŭrazio similas etajn ŝuojn kun purpuraj petaloj kaj orflava antaŭtuko.

La « orkidaceae » kreskas en tropikoj kaj dividiĝas en 2 subfamiliojn : la « orkioideae » kaj la « neoticae », kiujn oni trovas en la tuta mondo.

Ĝi eniris en la Historion dank'al princo, kiu, iafoje, konsentis pagi por ĝi tre altan prezon ; ĝia nura nomo elvokas la plej belan kaj plej raran floron.

Tro ofte oni forgesas, ke ĝia vegetala familio kovras 9 dekonojn de la plantoj kun floroj ; ĝi entenas 22 000 sovaĝajn speciojn. Je tiu nombro, ĉiujare aldoniĝas la 200 novaj specioj kreitaj de la naturo kaj de la hortikulturistoj.

Malŝatante nur absolutajn dezertojn kaj polusajn glaciejojn, tiu multnaskanta familio estas disiĝinta en la tuta mondo. Tamen ĝi preferas ekvatorajn kaj tropikajn regionojn kaj donas siajn plej belajn florojn en Sud-Ameriko. Je la fino de la lasta jarcento aperis en Amazona arbaro orkideo-ĉasistoj ; la plejmulto estis forkurintaj punlaboristoj. Multaj el ili mortis pro jaguaro aŭ febro. Tamen unu el ili fariĝis riĉulo en malpli ol tri jaroj ; hodiaŭ liaj posteuloj ankoraŭ ekspluatas la kafo-imperion, kiun

li kreis. La floro de orkideo, ĝenerale ambaŭseksa ne povas sin mem fekundigi ; ĝia poleno devas esti transportita sur la pistilon de unu el ĝiaj fratinoj ; ĝia propra pistilo povas esti fekundigita nur de ekstera poleno. En la humida tropika arbaro ne estas vento por okazigi tiun diseminadon. Naturo dotis orkideon je ruza sistemo. Ĉiu floro produktas nektaron tr ŝatatan de multaj insektoj kaj precipe de papilioj kaj ankaŭ de kolibroj.

La riĉaj koloroj de orkideo kaj ĝia delikata parfumo igas ĝin tre alloga. Por atingi la deziregatan nektaron la rikoltanto devas parte enŝoviĝi en la korolon ; tion farante ĝi tuŝas la stamenojn kaj ŝarĝas sin per la peĉeca poleno, kiun ĝi demetos (tion ne sciante) sur la pistilon de najbara orkideo. Kelkaj orkideoj, kiuj ne havas nektaron, eligas, por allogi la masklajn insektojn, la seksan odoron de iliaj femaloj. Aliaj faligas la insekton en ublieton, el kiu ĝi forflugas ŝarĝita je poleno. Ankorau aliaj jetas la polenon sur la vizitantojn dank'al veraj kapapulto, kiuj ekfunkcias je la plej malgranda kontakto.

Ĉiutempe orkideoj estis tre ŝatataj ; kelkaj atingis ekscesajn prezojn : en 1969 Grafo Neiperg pagis 10 000 or-frankojn por 3 orkideoj, kiujn li donacis al la 3 plej belaj virinoj en Kortega Balo. Sed la plej multekosta estis tiu, kiun princo Masserowsk donis al rusa imperiestro en 1886 kostis 6 000 or-frankojn !



Jam de longe la orkideoj estas amekultivataj de la hortikultivistoj. Ili malkovris, ke simbioza fungo estas necesa por la eloviĝo de la grajneto (simbiozo estas daŭra asocio inter du aŭ pluraj individuoj).

Poste la planto, por harmonie disvolviĝi, bezonas sufiĉe grandan lokon. Tamen la produktoj de tiu kulturo neniam atingas la mirindan sukriĉan amplekson de la sovaĝaj orkideoj, el kiuj kelkaj (kiuj kreskas sur iliaj plantoj sen eltiri el ili sian nutraĵon) kovras la foliaran kupolon de la ekvatora arbarego.

Estimataj pro la beleco de siaj floroj, la orkideoj estas ankaŭ uzataj en farmakopeo. Oni uzas ilin en fabrikado de medikamentoj, kiuj celas kuraci korajn perturbojn. La « likvoro de monaĥoj » devas al orkideo siajn kvalitojn ; ĝia ekologia rolo estas tre grava ; nepre necesaj al insektoj kaj al kolibroj, orkideoj estas parto de Tuto, kiu sen ili ne postvivus ; en tiu Tuto malapero de unu speco povas okazigi, laŭ la konsekvenco-leĝo, radikalan transformadon en la ekologia sistemo.


Ve ! en la industria landoj ili suferas pro la

ĉiam pli granda nombro da poluciigoj. Dume en ĝangalo, senarbigo, incendioj, disvastiĝo de la kulturoj ilin minacas.

Multaj specioj jam malaperis ; aliaj estas malaperontaj.

Por protekti ilin necesus konstitui botanikajn ĝardenojn en kiuj ĉiuj specioj estus arigitaj.

Tradukis E. CHERIE.




**VI NE SCIAS**

kiel aboni

**«KULTURAJ KAJEROJ»**

Nur rigardu la unuan aŭ la lastan kovrilpaĝon.

# Vivo kampara laŭ ritmo pasinta



Sub la premo de la teknika progreso, la mondo iamaniere uniformiĝas. Ĉie kaj en ĉiuj laboroj la maŝino regas kaj sin altrudas kun bruoj kaj rapidegaj movoj. Ankaŭ agrikulturo, tute laste, estas tuŝita de la modernismo. Oni jam al kutimiĝis al tiu transformiĝo sed kiam, dum momento, reaperas fulmorapide memorbildoj de antaŭ du jardekoj aŭ pli, ni konsciigas ke preskaŭ komplete jam malaperis kamparaj vivmodoj iam tradiciaj, de nun perditaj en pasinta epoko.

Ne temas ĉi-tie pri juĝo de la fenomeno, cetere en ĉiu afero estas bono kaj malbono. Mi nur klopodos ĉerpi el la junaĝaj memoraĵoj kelkajn tipajn trajtojn de la kampara vivo en Okcidenta Francio, el tiu regiono en kies centro troviĝas nia esperantista kulturdomo — Gresillon.

Oni devas scii, ke en nia regiono la farmoj estas plej ofte mezgrandaj kun apenaŭ 10 Ha. Oni kultivas ankaŭ malgrandaj kun apenaŭ 10 Ha. Oni kultivas cerealojn, fruktarbojn, legomojn kaj bredas bestojn. Do, laboro ne mankas. Kiam malaperas februaro kunportante en la regionon de l'forĝeso la lastan spuron de neĝo kaj la tagojn de rigora frostoj, ĉiuj homoj en la farmoj estas pretaj reiri al la kampoj. La tuta familio estas okupita ĉe la diversaj laboroj kaj ofte la infanoj devas en la fruaĝo jam partopreni dum la « liberaj momentoj » ekster la lerneja horaro. En la plej grandaj farmoj, se la anoj de la familio ne sufiĉas, ankaŭ deĵoras dungito. Pri tiu lasta, mi mencias ke la laborjaro komenciĝis je la Sankta-Johano — 24-an de junio. Tiu tago estis ankaŭ tradicie libera por la dungitoj. Ili, tiun tagon, sin proponis al nova mastro aŭ promesis al la antaŭa resti ankoraŭ dum unu tuta jaro.

Ek al laboro. El ĉiuj direktoj oni alvokas. La naturo revekiĝas. Jam fortaj estas la sunradioj kaj la tero eligas vaporojn. La grundo deziras liberiĝi el la vintra malsekeco. Jam floris la prunaroj, sek-

vas la persikarboj, la pirarboj, abundas la primoloj laŭlonge de la heĝoj kaj la violoj diskrete parfumas la arbaretojn, kie pendas perloŝpine la floroj de la avelujoj.

Necesas zorgi pri la vitoj, erpi la tritikokampojn, plugi kaj ree plugi, ĉio urĝas, jam floras la pomarboj. Baldaŭ ni parolos pri la falĉado de la fojno kaj en tiu epoko neniu kamparano pensis pri motoroj. La bravaj, majestaj ĉevaloj plenumas ĉiujn pezajn laborojn. Ili estas ankaŭ invitataj partopreni la senfinan kuradon de la printempaj laboroj. Same kiel la homoj ili multe ŝvitas ĉar dum la vintra ripozado ili ofte tro grasiĝis. Ni bone nutris ilin, eĉ tro kaj nun la mastro timas la danĝeron de malsaniĝosufokiĝo. Pensu, se mortus la ĉevalo estus katastrofo en la farmo. Pro tio, fakte, la ĉevaloj estis plejofte pli atenteme zorgataj ol la homoj mem.

De la sunleviĝo al la sunsubiro daŭras la laborotago de la kamparanoj, kaj ĉirkaŭ la somera solstico restas malmultaj horoj por dormi, sed dum la varmaj tagoj neniu neglektas ripozi post la tagmeza manĝo. Ankaŭ, de kampo al kampo, ĉe la heĝo, ofte okazis konversacio kun la najbaroj. Agrablaj momentoj dum kiuj ankaŭ ripozis la ĉevaloj kiuj ŝajne sekvas la konversacion kaj bone antaŭvidas la finon de tiuj sopirataj haltoj.

Kvazaŭ perforte portata en la kirlokuradon de la printempaj laboroj, kiam ĉiuj taskoj devas esti ĝustatempe efektivigataj, la kamparano povus aperi kun temperamento strikte individuista, sed la realo estas tute alia kaj lia sociema konduto kulmine manifestiĝas dum la rikoltado de la cerealoj aŭ pli precize dum la draŝado en la mezo de la somero. Kiu travivis tiun tempon, tiu neniam forgesos. Sed nun kun la modernaj falĉdraŝiloj, kiuj rapide plenumas ĉiujn fazojn de la rikoltado en nuraj horoj anstataŭ semajnoj, tiuj scenoj estas ne konataj. Pro tio mi plezure rakontos.

La granda tago alproksimiĝas — morgaŭ ni draŝos. Estas evento kiu necesigas multajn preparojn. Ĝi estas ankaŭ la rezulto de longaj laboroj. Ni jam rikoltis antaŭ kelkaj semajnoj, dum julio, kaj ĉiuj garboj estas amasigitaj en la korto de la farmo en unu aŭ pluraj stakoj pli altaj ol domo. Tie, de post la falĉado, la grenoj fine maturiĝis, la grajnoj tiel akiris pli malmolan staton. Kutime, pli ol tridek personoj partoprenas la aferon. La tuta najbararo estas koncernita. Oni invitas ilin kaj ĉio disvolviĝas laŭ kutimoj kiuj havas valoron de kontrakto malgraŭ ke nenio estis foje skribe stipulata. Estus grava ofendo forgesi inviti iun kiu kutime venis la pasintajn jarojn. Ĉiuj farmistoj de la ĉirkaŭaĵo inter

helpas unu la alian kaj tiel estas laŭvice invitatoj kaj invitantoj. Krome, estas proksimume taksata la daŭro de la draŝado laŭ la farmoj. Ĉu duontago aŭ plena tago kaj sekve oni diras : venu unu viro aŭ venu du. Sed ĉiuj venas plezure kaj ĉiam estas pli da homoj ol fakte bezonas ĉar estas festo kaj festeno. La antaŭan tagon, la dommastrino kun almenaŭ du najbarinoj preparas la kuiradon. Tre grava estas la reputacio de la kuiristinoj. Oni priparolas tion dum la tuta sezono. Pluraj arogantaj kokoj kokerikos la lastan fojon, same malaperos kelkaj anasoj kaj kunikloj. Bezonas prepari grandan kaldronon de supo, mueli kafon, prepari porciojn de porkaĵo, plenigi korbojn de salato, prepari multajn botelojn da vino ĉerpita el la bareloj kiuj ripozas en la malluma kelo. El malofte malfermitaj ŝrankoj oni forprenas telerojn, glasojn k.t.p... ĉio devas esti bone purigata por servi dece la gastojn. Oni ankaŭ instalas specialajn grandajn tablojn en la komuna manĝoĉambro, el kiu oni forprenis ĝenantajn meblojn. La preparoj daŭras ankoraŭ malfrue en la nokto kaj ni dormos tre mallonge. Antaŭ la pordo estas preparitaj diversaj ujoj kun pura akvo ĉar ne ekzistis fluanta akvo ĉe la krano... Tie la viroj lavos siajn manojn kaj blankaj viŝtukoj atendas pendende kroĉitaj ĉe la fenestrokovriloj. Finfine, ĉio estas preta. Bone, ankoraŭ kelkajn horojn de duonripozado antaŭ ol akcepti la draŝantojn.

Ankaŭ por la viroj estas preparlaboroj ĉirkaŭ la garbejo, en la grenejo. Por la vapor-maŝino kiu funkciigas la draŝilon bezonas akvo, kaj tie ne sufiĉas kaldronetoj kiel por lavi la manojn sed grandegaj kuvoj kun pli ol mil litroj. La puto estas profunda kaj la sitelo devos multfoje ĝin esplori por kompletigi la necesan provizon. La nigra maŝino ankaŭ postulas karbon. Tio ankaŭ devas esti preta. En tiu tempo certe la statistika scienco ignoris la prezon de la laborhoroj.

Jen la 4-a horo matene. Estas ankoraŭ nokte Unu petrollampo pendas de la plafono super ĉiu tablo. Ĉio estas preta, abundo da manĝaĵoj jam atendas la apetitulojn. Sur la tabloj, orde distribuitaj staras boteloj kaj glasoj, tasoj por la kafejo, butero, fromaĝo, diversaj porkaĵoj inter kiuj la famaj rijetoj.

Alvenadas la unuaj viroj. Ĉiu kunportas forkon de la laboro, ili tamen manĝos trankvile. Pleniĝas domon. Enirante, ĉiu solene diras : « Bonan tagon, Mastrino », kaj sen pli longe atendi ili altbliĝas. Ili venas piede aŭ bicikle laŭ la distanco. La unuaj manĝas longe, aliaj venas ankoraŭ post la komenco de la laboro, ili tamen manĝos trankvile. Pleniĝas la ĉambro. La murmuradoj transformiĝas en laŭtaj konversacioj kie finfine oni perceptas nur tondran bruon. La sorĉa vualo de la somera nokto fine ŝiriĝas, abrupte penetras la unuaj sunradioj. Fajfas la vapormaŝino kaj aperas la farmisto kiu distribuas

al ĉiu la rolojn. Ankaŭ tie kuŝas takto kaj protokolo kaj iuspeca kasta kutimo. Estas diversaj postenoj. La plej honoriga estas porti la sakojn plenajn al la grenejo. Generale bezonis 4 viroj por tiu laboro. Komprenoble, ili devas esti fortaj sed ankaŭ honorindaj. Atentu dum la elekto ! Komprenoble, ĉiam estas la samaj en tiu farmo aŭ en alia laŭ la grado de konsidero kaj ili multe fieras pri tio. Dum la laboro, ofte grimpante la ŝtuparon kun la peza sako surdorse, ili trairas la domon kaj rajtas, privilegio, ricevi de la kuiristinoj suplementajn trinkaĵojn (kafo, vino.) unuvorte, ili estas la aristokratoj. Aliaj prezentas la garbojn al la draŝilo, aliaj portas la pajlon al tiuj kiuj starigas la pajlostakon. Tiu lasta laboro postulas ankaŭ talenton kaj estas alia motivo de honorigo. Estas ankaŭ diversaj roloj ne tre agrablaj kie oni ensorbas multan polvon kaj tie oni ne parolas pri talento. La mastra elekto pli-malpli malice provizas ĉiujn postenojn, celante antaŭ ĉio ne rompi la ĝeneralan harmonion, ne ofendi iun. La vapor-maŝino jam akiris plenan energion je la sunleviĝo ĉar ĝiaj du prizorgantoj komencis la fajron antaŭ pluraj horoj. Nun ili manĝas solaj. Ili dormis plej ofte sur la garboj, sub iu remizo. Dum la tuta sezono ili estas nigraj pro la manipulado de la karbaj brikoj kaj videble ili timas akvon. Estis speciala gento iom stranga kaj duonsovaĝa (mi ne timas ke ili legos tion). Oni ŝerce nomis ilin : la oficiroj de la draŝilo.

Dum glate efektiviĝas la laboroj ĉirkaŭ la draŝilo, en la domo, la virinoj ne havas ripozon. Ili preparas la tablojn por la 10-a horo. Tiam okazos halto mallonga. Oni manĝetos laŭdezire kaj kontrolos la maŝinojn. Post tiu mallonga halto la laboro daŭras ĝis la 13-a horo. Jam estas varme kaj ĉiuj estas kontentaj ripozi dum la longedaŭra tagmanĝo. Estas vera festeno kun ĉiuj viandoj de la kortobirdoj, plie supo, legomoj, fruktoj laŭdezire, vino, tro da vino fakte ĉar ankaŭ dum la laboro oni proponas malavare la danĝeran trinkaĵon.

Posttagmeze okazas la pli longa etapo de la laboro. Foje, se estas finita ĉe la unua farmo oni tuj transportas la draŝilon al najbara farmo kaj tie oni daŭrigas, aŭ oni restas sur la sama loko se la kvanto tion necesigas, ĉiumaniere, ĉiuj retroviĝas vespere por la lasta manĝo de la tago. Tiu lasta daŭras tre longe, ĝis noktomezo kaj se estas iu sabato vespere, la farmisto devas toleri siajn amikojn la tutan nokton. Amasiĝis en la grenejo ĉe la supera etaĝo de la domo (alidire-en la subtegmentejoj) la tuta rikolto : tritiko, hordeo, aveno. En la korto ĉio aspektas alie, la garboj malaperis, starigiĝis giganta pajlo-stako, malordo regas en ĉiuj anguloj. Amasetoj de duakvalitaj grajnoj dise en la korto estas la feliĉo de la kokinoj.

Ĉiuj estas kontentaj, la etoso estas tute gaja. Ĉe la tabloj oni tre laŭte parolas kaj ridas, subite



sin anoncas kuraĝa plezurgvidanto kiu proponas kantadon. Dume, oni rapide transportis la pezan vapormaŝinon kaj la draŝilon ĝis la najbara farmo. Almenaŭ 3 ĉevaloj estas necesaj por tiri ĉiun pecon laŭ vojoj malebenaj. La morgaŭon rekomenciĝos la sama laboro kaj tio daŭros la tutan monaton aŭgusto.

En ĉiu farmo oni same festenas je tiu okazo kaj estis kutimo proponi partoprenon ĉe la tablo al ĉiu okaza preterpasanto. Ekzemple : la leterportisto estis tradicie certigata esti bonvenata en la granda farmista familio. Tie, li senĝene deprenis la kaskeдон kaj la sakon, distribuis la poŝtaĵon al ĉiuj kaj ne bezonis pluen iri.

Estis sufiĉe da manĝaĵoj por ĉiuj eventualaj vizitantoj. La morgaŭon, kiam la viroj de la farmo estas for ĉe la najbaroj por sama laboro, la virinoj reordigas la domon kaj konstatas ke restas ankoraŭ multaj varoj ne utiligataj kaj oni forte esperas ke venos vizitantoj por akcepti ilin ĉe la tablo.

Fakte, ĉiuj kamparanoj sekrete antaŭĝojis retroviĝi ĉiujare, grupe, okaze de la draŝadoj. Estas varme, oni ŝvitas en la polvo sed ne gravas. Estas la granda festo de la amikeco, de la fideleco al la gentoprofesiaj kutimoj.

P. METIVIER (daŭrigota).

« STELO » Kampadejo en Balaruc-les-Bains (34)

Ĉiujare okazas de la 1-a ĝis la 15-a de Julio

# INTERNACIA RENKONTIĜO

kie

## ESPERANTO ESTAS LA KOMUNA LINGVO

Skribu al : LENTAIGNE 34 - Balaruc-les-Bains (Francio)

## En San Agustin — Kolombio :

# Vivantaj enigmoj de la Prahistorio

En sudo de Kolombio, flanke de Kordilero, ŝton-dioj, plej ofte kolosaj, fantomas en montetoj kaj arbaroj. Ili venas, de antaŭ 2500 jaroj, el civilizacio, kiu daŭris 15 jarcentojn. Proporcioj de la statuoj, stilizo de la formoj montras parentecon kun azteka kaj zapoteka artoj.

Megalitaj monumentoj — proksimume 400 statuoj, inter kiuj kelkaj estas 4m-altaj, sarkofagoj el ŝtono, tiaj estas, en Kolombio, la mirindaj restaĵoj de la prahistoria Kulturo, tute ne konata ĝis la komenco de nia jarcento.

San Agustin estas la regiono, kiu entenas tiun jarmlan ŝton-heredaĵon; ĝi situas sude de Kolombio, sur la orienta deklivo de Kordilero. La grandega riverego Magdalena tie fontas; aliaj riveregoj (Mulale, Quinchana, Bordonos) ĝin trairas. La vilaĝo San Agustin situas 1700 m. super la maro, meze de montetoj kaj arbaroj superstarataj de kelkaj monto-pintoj. En la ĉirkaŭaĵoj de San Agustin temploj kaj statuoj atestas ekzistadon, en tre malproksimaj tempoj, de loĝantaro, kies civilizacio antaŭas tiun de Inka-oj kaj prezentas multajn enigmojn.

Tiu arkeologia regiono, hodiaŭ Nacia Parko, etendiĝas sur pluraj centoj da km<sup>2</sup>. Nur malmulte oni malkovris kaj probable la arbaroj ankoraŭ kaŝe enhavas multajn enfositajn sekretojn. Sajne, ĉio okazis kvazaŭ ruza ĝenio amuziĝis kaŝi tiujn fascinantajn bildojn skulptitajn de uloj, kies memoraĵo mem malaperis. La hispanaj Konkistadoroj, kiuj esploris kaj okupadis la regionon eĉ ne suspektis ĉeeston de tiuj ŝtonaj monumentoj kaj la famaj historiistoj Fray Pedro Simon, Pedro Cieza de Leon, don Juan de Castellanos, eĉ ne unu vorton diris pri tio.

### Manuskripto forgesita en monaĥejo en Balearoj

Estas nur en 1757, ke hispano Fray Juan de San Gertrudis vidis pastron de urbo Popoyan febre fosi en tomboj kaj teramasoj, cele al malkovro de ia ain trezoro. La skriba rakonto de San Gertrudis estis plei grava... sed ĝi dormis en monaĥejo de Palma de Majorque dum du jarcentoj: nur en 1956 oni ĝin eldonis kaj konatigis.

En 1797 la kolombia sciencisto Francisko José de Caldas vizitis la regionon kaj skribis mallongan studon pri la loka geografio.

En la 19-a jarcento kelkaj vojaĝantoj: kolombiaj, francaj, anglaj, Italaj kaj germanaj vizitis

San Agustin kaj elvokis ĝiajn misterajn restaĵojn... kiuj tamen ne eliris el ombro.

La riveladon oni ŝuldas al Konrad Theodor Preuss, germana etnologo. Li laboris en tiu regiono en 1913-1914, kaj raportis siajn malkovrojn en sia verko « Prahistoria Monumenta Arto ».

Post kiam la Kolombia Ministrejo pri Edukado havigis al si la terenojn kaj kreis la Arkeologian Parkon en 1965, la laboroj iĝis sistemaj.

En 1936-1937 José Perrez de Barradas, kolombia arkeologo, estis la unua, kiu efektivigis prifosojn kaj publikigis en 1943 sian studon pri la San Agustin-trezoroj. Ankoraŭ nun ĝi restas la plej kompleta kaj plej detala.

Luis Duque Gomes, alia kolombia arkeologo, faris pli poste, novajn prifosojn kaj skribis novajn studojn.

### San Agustin - Kulturo

Trideko da arkeologiaj sitoĵ estis malkovritaj inter kiuj « la Malgrandaj Plataĵoj », « la Monto je piedbanoj », « la Monto je lavejoj », « la Monto je idoloj », « la Fruktogardeno ».





Laŭ Perez de Barradas, la San Agustin-Kulturo, kiu etendiĝis laŭ pli ol 1500 jaroj povas esti rigardata kiel « nord-anda-megalita-kulturo »; tiu esprimo montras samtempe la karakteron de ĝiaj monumentoj, ĝian geografian situon kaj ankaŭ ian parencecon kun Tiahuanaco-Kulturo en Bolivio kaj Chavin-Kulturo en Peru-o.

Pri ĝia apero, ĝia evoluado, ĝiaj rilatoj kun la ekstera mondo, estas ankoraŭ ne eble esprimi hipotezojn.

Luis Duque Gomes opinias, ke oni povas distingi 3 periodojn en San-Agustin-Kulturo

**La unua** (de 555 a. K. ĝis la 4-a jarcento de nia erao) estas karakterizata de tomboj kun lateraj ĉambroj, ĉerkoj el ligno, skulptaĵoj sur ligno kaj apero de laboro sur oro.

**La dua** etendiĝus de la 4-a ĝis la 12-a jarcento. De tiu periodo datumas funebraj teramasoj kaj cindro-urnoj, monolitaj sarkofagoj, kremacio kaj statu-arto.

**La tria**, kiu finiĝis en tempo nedefinita, ŝajne distingiĝas per rond-formaj domoj kaj realista skulptado sur ŝtono.

Probable la praaj navigistoj el Centra Ameriko laŭlongis la nordajn marbordojn de sud-Ameriko ĝis Peru-o kaj konatigis al la loĝantoj maizo-kultivon, jaguaro-kul-

ton kaj diversajn arto-formojn. Cetere Peruo-influo sendube ankaŭ atingis Kolombion.

Laŭ Konrad Th. Preuss, San Agustin-Kulturo havas proprajn karakterojn : **en arkitekturo** : la megalitaj konstruaĵoj montras nur templojn kaj sepultejojn (ŝtonajn sarkofagojn ofte enfermitajn en grandaj tombo-monumentoj) ĉiu el ili estas farita el enormaj ŝton-slaboroj (mirinde kelkaj temploj similas la eŭropajn dolmenojn; tamen tio ne permesis ion ajn indukti) **en skulptado** : San Agustin-Kulturo esprimiĝas precipe per monumentaj skulptaĵoj : diverseco kaj riĉeco de la statuoj estas eksterordinaraj; ĉar formoj kaj stiloj estas plej diversaj, oni opinias, ke tiu skulptoarto etendiĝis sur longa periodo.

## Statuoj

Ili ofte precizajn normojn : misproporcio ĉe kapo kaj korpo, neverŝajneco ĉe formoj kaj sintenadoj; grandioza aspekto ofte emociplena (ekz, ĉe triangula kapo preskaŭ 2m-alta).

Ĝenerale la kapoj estas enormaj, la korpoj dikmalaltaj kaj masivaj, la membroj mallongaj kaj rigidaj. La artisto detalis precipe la vizaĝon (kelkfoje la vizaĝo similas nazegon, alfoje temas pri maskitaj personoj).

La buŝo estas larĝa aŭ kvadrata kun elstaraj kaniĵoj kaj eĉ eliganta rubando, kiu portas ĉe sia fino bestokapo (kies signifon oni tute ne konas). Kelkfoje la lango eliras el la buŝo (tion ĉi oni ankaŭ trovis en Pacifik-insuloj, en azia Sud-Oriento, kaj ĉe Indianoj de nord-orienta Kanado).

La okulo estas diversmaniere reprezentita : aŭ ronda, aŭ kvadrata, aŭ migdal-forma, aŭ simpla fendo, aŭ kvazaŭ voluta, tio, kio ŝajnigas la personon fantasta aperaĵo.

Duon-homoj, duonfelisoj, tiuj strangaj kolosaj figuroj portas braceletojn, kolierojn kaj kelkfoje tenas en siaj manoj martelegojn, sceprojn aŭ trofeojn.

Ofte la San Agustin-statuoj estas duoblaj; eta persono sidas sur la ŝultroj de la alia. Tiu « alter ego » simbolas la dupersoniĝon de la memo.

## Ĉu religia simbolo ?

Perez de Barradas opinias, ke, kvankam skulptaĵoj montras realistan esprim-manieron, magio ilin inspiris : « kelkaj San Agustin-statuoj montras stilizadon kaj misformadon ĝis fantasteco, kaj samtempe precizan scion pri anatomio ».

## Evidenta estas la religia simbolo :

La antropomorfaj reprezentadoj de diaĵoj abundas dum la malplej gravaj dioj ricevis nur bestan formon : serpentan, lacertan, simian, aglan. Oni scias nur malmulte pri la unuaj loĝantoj de San Agustin; sendube ili kontentiĝis per pajla kabano kaj fabrikis rudimentajn ilojn, kiujn ili ne perfektigis laŭlonge de la jarcentoj.

Sed por siaj dioj la San Agustin-Homo konstruis templojn el pezaj ŝtonoj, kiujn ili transportis el la ŝtonmino kaj skulptis, kun senlaca pacienco, koste de obstinega laboro kaj titanaj klopodoj, statuojn de diaĵoj, kies aspekto kaj perfekta arto mirigas nin.

el Courrier de UNESCO  
Fernando Sanz

## **Anticipo : Tra la Galaksio**

# **La spaca rado de la ufi-anoj**

Eteta « okulo » ruĝiĝas kaj palpebrumas ; kune Mekanikisto, Bioteknikisto kaj la Navigisto faras geston al ekrano ; ĝi montras iun sunon « fekondigitan », sunon kun ĝiaj 12 planedoj kaj 44 satelitoj. Tiu bona suno ŝajnas bona patro de multnombra familio, kiu promeniĝas sian bubaron. Sed neniu el tiuj planedoj taŭgas ; ili ne entenas la necesan Specialan Nutraĵon ; ili ne estas « miam-miam-planedo », kiel diras la Mekanikisto. La Biokemiisto premas ŝaltilon kaj la 2 exploremaj antenoj similaj je heliko-palpiloj kliniĝas ; ilia sensebleco estas tia, ke eĉ malproksime je cent milionoj da kilometroj ili scias ĉu temas aŭ ne pri « miam-miam-planedo ».

La Mekanikisto premas alian ŝaltilon kaj la Spaca Rado ĝiras kaj direktiĝas al ankoraŭ nevideblaj galaksioj.

La Navigisto, pro malpacienca reflekso, premas trian ŝaltilon : la akcelan ŝaltilon. De tiam la lumo kun siaj 300.000 km-sekunde ŝajnas limako, kiu restas malantaŭ ili ; ĉar la celita Suno lokiĝas je 3 miliardoj da kilometroj, (t.e. 3-lumojaroj), necesos longtaga vojaĝo.

Ho, Ve ! tiuj 12 planedoj kaj tiuj 44 satelitoj estas nur asteroidoj, do nur polvo de ŝtonoj sur kiuj estas nenio manĝebla !

« Suno je babordo ! » diras la Mekanikisto, sed kiom malproksima ! sendube almenaŭ je 12 lum-jaroj ! De tiel malproksime oni ne povas scii ĉu ĝi taŭgos ! La exploremaj antenoj montras direkton, kaŝiĝas en la fuzon kaj la Spaca Rado daŭrigas sian iradon.

Pesimistaj estas la tri Navigantoj !

Antaŭ unu jaro la Ufi-anoj malkvietiĝis ; nutraĵo rapide elĉerpiĝis sur ilia planedo kaj ili sendis tra la Universo 60 Spacajn Radojn. Neniu el la 59 aliaj Spacaj Radoj sukcesis en sia esplorado tra la Galaksioj. Dum unu jaro ili vane esploris la « Kampon de la Steloj ».

La ondoj anoncis, ke unu post la alia

la 59 Spacaj Radoj mortis pro inanicio. La Tri-Navigantoj estis ĉe la lasta Spaca Rado. Tion ankaŭ sciis la 3 miliardoj da Ufi-anoj sur la Patrino Planedo.

Post ekzameno de la nutraĵo-disdonilo la Mekanikisto anoncas : « restas nutraĵo por du tagoj ; kiom da tagoj oni povas resti sen manĝi ? apenaŭ 8 tagojn ! »

Baldaŭ ili mortos pro inanicio kaj ankaŭ sur la Ufi-planedo iliaj samuloj, kiuj ĉion preparis por elmigrado, tuj kiam venos la ege dezirata alvoko.

### **SUR TERO**

« Ne, ne estas eble, ke nova milito eksplodu ! ĉu vere povas komenciĝi tiu apokalipsa flugado de ĉiaj rakedoj ? »

Sed al ultimatoj sukcesis akordiĝo-mesaĝoj de Supergrandulo al Supergrandulo. Paco-kolombo transflugis oceanojn. Renkontiĝo ĉe la Super-Supraĵo okazis kaj alportis « Definitivan Pacon » !

Tamen jen la vero : en Granda Sekreto, la Sciencistoj serĉis la « absolutan » armilon. Spionoj ambaŭflanken portis la eltrovojn. Sed tion la Supergranduloj ne sciis kaj ĉu ili opiniis sin la plej Supera... kaj okazis, ke ambaŭ, samtempe, premis la etan ŝaltilon. Tio okazis *sammomente*, je la naŭa matene. Supergranda Pirotekniko !... Je la 17-a kaj duono la milito estis finita (ĉu ne, la plej bonaj ŝercoj estas la plej mallongaj!).

Batalantoj el ambaŭ kampadejoj estis mortintaj ; en la neŭtraj landoj, la loĝantoj, terurigitaj de la evento nelonge funebris ... post kelkaj horoj la radioaktiveco, rapide disvastiĝinta, ilin kuŝis sur la patrino Tero ; ĉiujn sen escepto, eĉ bestojn, eĉ plantojn, sur tero kaj ankaŭ en oceanoj.

Jen vera apoteozo de la Scienco : planedo ekzekutita, por ĉiam sterila, korodita ĝis la koro de la centra kerno : ĉio gangrenita, venenigita, putrigita.

Ludante per fajro, Prometeo fine gajnis !

## EN LA UFI-SPACA RADO

La 2-esploremaĵoj antenoj ĵus montris novan direkton ; sur la ekrano, tre malproksima Suno faras verdan makuleton. Interne, jam de 6 tagoj ne plu estas nutraĵo ! densa malvarmo paralizias la membrojn de la 3-Navigantoj ; iliaj pensoj endormiĝas ; dikaj skvamoj iom post iom kovras ilian korpon kaj sin lutas unuj ĉe la aliaj ; iliaj okuloj fermiĝas.

La Ufi-anoj ne spiras kiel la homoj ; ili sin nutras pere de siaj haŭto-poroj ; ilia nutraĵo estas tute aparta ; ili nepre bezonas tiun Energion, kiun la homoj nomas : radio-aktiveco. Sed nune iliaj maŝinoj ne plu funkcias ; por ili estas agonio ; ankaŭ por iliaj fratoj sur Ufi-planedo, kiuj vidas kaj scias. Ĉar la 3-Navigantoj ne trovis la « miam-miam-planedon », ankaŭ la Ufi-anoj mortos pro inanicio.

Subite dolĉa opaleska lumeto radias en la pilotejo. Tio signifas : « ĉi tie troviĝas radio-aktiva planedo » « Halucino », pensas la Biokemiisto. Sed kvazaŭa moskito-zuma-

do vekas la Mekaniksiton ; li diras « aŭskultu ! »

La moskito-zumado fariĝas muŝo-zumado kaj eĉ abelo-zumado ! Tiu zumado iĝas pli kaj pli potenca. Ne nur la 3-Navigantoj ĝin aŭdas sed ankaŭ la 3 miliardoj da Ufi-anoj ! La 3-Navigantoj pene sin trenas, malfacile stariĝas, apenaŭ vidas per siaj preskaŭ blindaj okuloj. La ekrano certigas : jen fine la miam-miam-planedo. La Spaca Rado impetegas al Tero. Kia fabela Kuko ! La Spaca Rado alteriĝas en kalcinitan dezerton. La 3-Navigantoj rampas el la Spaca Rado, kuŝiĝas, agoniantaj, sur tiun grundon, kiu eligas Radio-aktivecan nutraĵon ; ili sin banas en tiu nutraĵo ; iliaj okuloj pli bone vidas, iliaj skvamoj forfalas, iliaj poroj larĝe malfermiĝas !

« Paradizo, estas Paradizo » ekkrias la 3-Navigantoj Kompreneble la Providenco ne volis ke la Ufi-anoj mortu. De « progreso en progreson » la Homoj ĉion nuligis sur sia planedo kaj la Ufi-anoj atingis tiun Edeon : la Senvivan Teron !

UFI-ANO.

# POR VIA DISTRO

## NIA KONKURSO

La solvoj estas sendotaj al S-ro P. Chevalier, 19 bd, G. Lauriol — 44 - Nantes - Francujo — antaŭ la fino de marto.

**Unua problemo** : 20 poentoj.

Bonvolu anstataŭigi per la konvenaj vortoj la punktojn en la ĉisubaj frazoj. Sed Atentu! Estas kalkulitaj po 2 poentoj por ĉiu vorto ĝuste trovita, sed estas forprenita po I poento por ĉiu vorto malĝuste elektita.

- 1) Kuraĝon mi havas sufiĉe por iri nudapiede.....la mezon de la infero.
- 2) Vi ne havas eĉ tiom..... hontemeco, por honti pro tiuj paroloj.
- 3) Lasu la .... dormi kaj feliĉigu la vivantojn.
- 4) Cikado kantadinte ... tutan, troviĝis senproviza.
- 5) Ili malpuriĝis .... siaj faroj kaj malĉastiĝis ... siaj agoj. (duoble la sama vorto).
- 6) Multaj arabaj gentoj .... nutras preskaŭ ekskluzive ... daktiloj.
- 7) Mi volas, ke li aŭskultu kaj ke li .... silenti.
- 8) La gepatroj, kiuj tro dorlotas .... infanojn faras al ... multe da malbono.

**Dua problemo** : 20 poentoj.

El la ĉisubaj frazoj, kelkaj estas korektaj kaj kelkaj nekorektaj. Bonvolu korekti la erarojn, sed nur la erarojn, ĉar estas kalkulitaj po 2 poentoj por ĉiu eraro ĝuste korektita, sed estas forprenita po I poento por ĉiu malbona « korektado ».

- 1) La gepatroj de Jozefo tre ĉagrenis pro lia mal-diligenteco.
- 2) Mi kredas, ke homo nur plene vivas, kiam li havas kreaĵojn el lia ĉiutaga laboro.
- 3) Mia filo estas soldato kontraŭ lia volo.
- 4) La kvanto da ŝanĝoj en la manuskripto estas tre granda.
- 5) La grandega nigra hundo montris al ni ĝiajn danĝerajn dentojn.

- 6) Atenton mi petas por la jenon!
- 7) Boteloj plenaj da akvo estas tre pezaj.
- 8) La tuta mondo konspiris kontraŭ Izrael, sed fariĝis fiasko.
- 9) La estraro esperas, ke ni kune havu agrablajn, lernemajn kaj amuzajn vesperojn.

## AMUZAJ PROBLEMOJ (apartaj de la konkurso)

— Solvo de la problemo aperinta en la antaŭa numero.

### LA PILKO LUDO

Nigra pilko valoras 30 poentojn, la blanka pilko valoras 20 poentojn, la striita pilko valoras 15 poentojn :

$$\begin{aligned} 30 + 20 + 20 + 15 &= 85 \\ 30 + 30 + 15 + 20 &= 95 \\ 30 + 20 + 15 + 15 &= 80 \end{aligned}$$

### — NOVA PROBLEMO NOMBRA ENIGMO

Ĉiu nombro signifas unu literon. La solvo konsistas el 60 Literoj. La ŝlosilvortoj estas :


- 9, 6, 26, 39, 2, 13, 14, 12, 27, 4 : esperantista insigno.  
51, 41, 42, 10, 59, 60 : soldata virto.  
16, 53, 11, 48, 49, 50, 39, 21, 53, 8 : okcident-eŭropa ĉefurbo.  
37, 38, 31, 29, 30, 5, 35, 36 : senpieda surtera besto.  
45, 46, 47, 33, 3, 56, 55, 52 : nazkorna besto.  
32, 4, 34, 17, 25, 1, 15, 23, 19, 8 : granda muzikilo.  
7, 28, 20, 2, 57, 58, 40, 18 : itala violonvirtuozo.  
26, 15, 24, 44, 22, 18 : denove fari la samon.  
43, 46, 54, 31, 60 : altpreza spicaĵo.  
1,60 : vortoj de profesoro Albert Einstein.

# GRAMATIKO PER BONHUMORO

ANSTATAŬ signifas « en la loko de », « en la rolo, la funkcio de ».



- Ĉu por via svelteco vi nun uzas biciklon anstataŭ vian aŭtomobilon?
- Tute ne, sed, ĉar finfine mi trovis lokon en en la parkejo, mi ne volas ĝin perdi.



Mi petas vin, sinjorino instruistino, ĉu ne estus pli bone anstataŭigi mian lacan cerbon per mia notlibreto?



- Mi esperas, ke tiu nubo tuj malaperos, ĉar, pro urĝa bezono, mi ne longtempe povos anstataŭi foston.

# Niaj perantoj

- Aŭstrio** : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichstrasse 2, LINZ (45 aŭstr. ŝil.).  
**Belgujo** : S-ro Guyot Mateo, 18, rue Chefneux, BARCHON, Lg. (85 fr.).  
**Britujo** : S-ro Frank Ashpole, 127, Midford Rd, Combe Down, BATH BA2 5Rx (15 ŝil.).  
**Ĉeĥoslovakio** : S-ro Dezidero Koronczi, Nabrezie Metoda 1707/16, PRIEDVIDZA (2 us. dol.).  
**Danlando** : S-ro Ulrik Rasmussen, Norregards vej 66, 2610, RODOVRE.  
**Finnlando** : S-ro Joel Vilkki, SOMERO 9 - Pĉk. : Tu 60253 (9 mk.).  
**Germanujo Okc.** : S-ro Joseph Bode, 35 - KASSEL-OBERZWEHREN, Hinter der Brücke 22, pĉk. Frankfurt (M) 234-759 (6,2 mk.).  
**Hispanujo** : S-ino Jozefino Monter Palomar, Muntaner 416, 1º, la, BARCELONO (110 pes.).  
**Italujo** : Itala Esperanto-Federacio, Via Po 7, TORINO (1.000 lir.).  
**Japanujo** : S-ro Tara Nišiumi, 6-31-19 Kita-Koiwa Edogawa-Ku, 133, TOKIO - pĉ Tokio 44163 (640 jenoj).  
**Jugoslavio** : Slovenia Esp. Ligo, Komenskega 7, LJUBJANA, poŝtfako 239 (1520 d.).  
**Nederlando** : S-ro M. de Waard, Anemoonstraat, CAPELLE AAN DEN IJSSEL, ZH pĉk. 209721 (7 guld.).  
**Norvegujo** : S-ino Marit Delor, Solveien 143-B, LJAN.  
**Peruo** : S-ino Skotte, Malecon Paul-Harris, 336, Dto 200 BARRANCO (Lima).  
**Pollando** : Asocio de Esperantistoj en Pollando, Nowy Swiat 27, VARSOVIO (60 zl.).  
**Rumanio** : S-ro Adrian Boldan, p.k. 1412, BUK UREŝTI - 6. (27 lei).  
**Svedujo** : S-ro Roland Dupuis, Helgagatan 36, uppg 13, STOCKHOLM Sö pĉk 157007 (10 kr.).  
**Svislando** : S-ro Cl. Gacond, Miéville, 133 - 2314 LA SAGNE.  
**Tajlando** : S-ro C.L. Unchitti, GPO box 1231, BANGKOK (2 us. dol.).  
**Usono** : S-ro D.W. Hoffman, 1444 Leslie Street, HILLSIDE (N.J.) (2 dol.).  
**Aliaj landoj** : Ni serĉas perantojn en aliaj landoj. Oni povas pagi la abonprezon per steloj (20 st.) aŭ respondkuponoj (12 respk.), per libroj aŭ per neuzitaj poŝtmarkoj. Sin turni al la Direktoro.



## KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ  
Maine-et-Loire  
FRANCUJO

## ESPERANTISTA KULTURDOMO

De junio ĝis septembro ĉiulandajn esperantistojn kaj eventuale iajn ajn karavanojn frue anonciatajn

### Akceptas :

- Por ripozi trankvile en atmosfero frateca ;
- Por eklerni aŭ plulerni la internacian lingvon ;
- Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;
- Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
- Por studi specialajn problemojn ;
- Por inter amikoj gaje libertempi ;
- Por ekskursi tra centr-okcidenta Francio.

## venu al la esperantista kulturdomo

Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkupono al :  
ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, BAUGÉ (Maine-et-Loire) Francujo



# LA VIE DE GRÉSILLON

## ENTRE NOUS...



Dans le dernier numéro, je posais la question : « Les modifications apportées à la répartition des stages dans le programme d'été plairont-elles ou seront-elles mal accueillies ? ». Il est évidemment beaucoup trop tôt pour le dire. Nous avons des demandes de renseignements pour tous les stages, comme d'habitude, mais tout de même un peu moins pour le 4<sup>e</sup> stage et un peu plus pour le premier. Attendons encore pour voir si cette tendance se poursuivra et si ces modifications amèneront l'équilibre souhaité entre les stages.

Pâques approche. La Semaine Culturelle s'annonce bien pour l'instant, et nous conseillons à tous ceux qui désirent venir à cette époque de retenir rapidement leur place. Nous avons déjà reçu quelques inscriptions également pour la 2<sup>e</sup> semaine. Je rappelle qu'une réduction est accordée à ceux qui resteront au château pendant les deux semaines (4-16 avril). Les inscriptions vont bon train également pour le Post Kongreso de S.A.T. Cette semaine, aux activités variées est ouverte à tous les espérantistes, membres de S.A.T. ou non.

Aussitôt que la neige eut abandonné les prairies et les toits, les travaux ont commencé à Grésillon. Les terrassements sont en cours pour l'installation d'un système de décantations des eaux usées. Ces travaux doivent être terminés pour le début de mars. Après Pâques, quelques rénovations intérieures seront faites, en particulier la remise à neuf d'une chambre et d'un dortoir. Et là devront se limiter les dépenses pour cette année. En décembre et janvier, le jardinier a préparé le jardin et entretenu la propriété, dégagé les allées du bois. Il est normal que vous trouviez un cadre agréable lorsque vous venez au château, mais cela demande bien du travail. Même lorsque vous ne constatez pas de changements spectaculaires, n'en déduisez pas que rien n'a été fait. Le simple entretien du château et du parc absorbe une bonne partie des bénéfices chaque année. Une augmentation du nombre des séjours augmente la part qui revient aux investissements, les dépenses entretien étant constantes. Alors venez nombreux.



# PROGRAMME 1971

PREMIERE SEMAINE : Arrivée le 4 - Départ le 9 avril.

## **10<sup>e</sup> Semaine Culturelle**

organisée par U.F.E.

Initiation pédagogique à l'enseignement de l'Espéranto. — Cours — Conférences — Pratique de la langue.

DEUXIEME SEMAINE : Arrivée le 9 — Départ le 16 avril.

## **Semaine d'Etude**

Cours — Pratique de la langue

### **Première Période**

Arrivée le 4 juillet — Départ le 25 juillet

## **Semaines Culturelles et Espérantistes**

Cours pour débutants — Cours pratique — Cours supérieur.  
Préparation aux différents examens.  
Reliure, vannerie, émaux.

### **Deuxième Période**

Arrivée le 25 juillet — Départ le 7 août

## **Quinzaine Internationale**

Conférences — Excursions : connaissance du Val de Loire

### **Troisième Période**

Arrivée le 7 août — Départ le 14 août

## **Postkongreso de S.A.T.**

(après le congrès de Paris)

### **Quatrième Période**

Arrivée le 15 août — Départ le 4 septembre

## **Semaines d'Etude**

Cours pour débutants — Cours pratique — Cours supérieur.  
Préparation aux différents examens.  
Reliure, vannerie, émaux.

**Excursions possibles** : Châteaux de la Loire, Angers, Le Mans, La Flèche, Nantes, Le Lude.

**Il est recommandé de retenir sa chambre longtemps à l'avance**

## VOUS POUVEZ COMMANDER

Vos livres d'étude

Vos dictionnaires

Vos livres de littérature, poésie,  
théâtre, histoire, géographie,  
sciences, à notre Service Librairie.

Adresser commandes et chèques de paiement à :

### MAISON CULTURELLE ESPERANTISTE

49 - Baugé

C.C.P. Nantes 1485-39

Prix franco au-dessus de 5 Fr.

Demandez notre catalogue.

### NOUS TENONS EGALEMENT A VOTRE DISPOSITION :

Cartes postales de Grésillon :  
noires : 0,40 F.  
couleur : 0,50 F.  
Cuillères de collection : 9,00 et 12,00 F.  
Pendentifs : 7,00 F.  
Disques de stationnement : 3,00 F.  
Etoiles pour vitres de voitures : 1,00 F.  
Disque 30 cm avec chansons de  
Bob Dylan interprétées par le  
Duo Espera : 28,00 F.

et :

**Les Héros Existentialistes**

(texte français-esperanto)

de Colette Llech-Walter : 3,00 F.

(plus frais d'envoi pour commande au-dessus de 5,00 F.).

## POUR VOS COURS DE PERFECTIONNEMENT

Le livre qu'il vous faut :

**POR LA PRAKTIKANTOJ**

de **P. Babin**

Prix : 8,50 F.

## NOS COURS PAR CORRESPONDANCE

**Cours 1<sup>er</sup> degré.** — 16 livrets illustrés qui permettent d'acquérir les bases essentielles de la langue. Cours et corrections : 50,00 F.

**Cours 2<sup>e</sup> degré.** — 14 leçons présentées sous forme de feuillets. Permet d'acquérir une connaissance pratique de la langue. Cours et corrections : 50,00 F.

**Cours 3<sup>e</sup> degré.** — Excellent entraînement à un cours supérieur : versions, thèmes, étude de textes. Cours et corrections : 30,00 F. Nous pouvons fournir les livres de cours à ceux qui ne les possèdent pas déjà.

